



# POLA ESPERANTISTO

Monata Gazeto por propagando de Esperanto



## ESPERANTYSTA POLSKI



Miesięcznik poświęcony sprawie Języka Międzynarodowego

Oktobero 1911

WARSZAWA—VARSOVIO.

Jaro IV (vi) — Nro 10 (55)

### Jak stajemy się esperantystami?

Esperantystą przychodzi się na świat albo się nim zostaje z czasem.

Człowiek rodzi się esperantystą tak, jak się przychodzi na świat muzykiem lub matematykiem.

Bo, właściwie, co to jest być esperantystą?

Esperantysta — to osobnik, który posługuje się językiem pomocniczym międzynarodowym, utworzonym przez d-ra Zamenhofa.

Ale to nie wszystko. Esperantysta to jeszcze coś innego.

Aby być esperantystą, trzeba oddać całą swoją inteligencję, całe swoje serce na usługi sprawy pięknej i szlachetnej, której celem jest ułatwienie stosunków między ludźmi nie tylko w życiu codziennym, ale i w dziedzinie intelektualnej.

Miljony ludzi od czasu zburzenia wieży Babel rodziły się, żyły i marły esperantystami przedtem, nim się fakt stał rzeczywistością: marzyli oni o zbliżeniu narodów, o braterstwie, udoskonaleniu ludzkości, marzyli bezskutecznie, nie posiadając środków do urzeczywistnienia swoich pragnień. I dopiero w drugiej połowie dziewiętnastego wieku ludzie poznają genialny twór d-ra Zamenhofa — język międzynarodowy Esperanto.

Postęp na tej drodze, aczkolwiek powoli, ale nieodwołalnie da się odczuwać. Ludzie — z przeznaczenia espe-

rantyści — zbadawszy nowy język, przyjęli go bez wahania jako nowy łącznik między narodami, — do którego wzdychano tyle wieków, i stali się apostołami sprawy, nie zważając na uśmiechy, drwiny, powątpiewania innych, nie rozumiejących jej doniosłości. Liczba ich wzrasta z każdym dniem, w miarę jak postęp w tym kierunku staje się widoczniejszym i przenika w sferę intelektu, gdzie grunt jest oddawna przygotowanym.

I to są esperantyści z urodzenia.

A teraz zobaczmy, jak większość ludzi staje się esperantystami.

Od dawna już niema osobnika, któryby nie czytał lub nie słyszał o Esperancie. Aczkolwiek nazwa nie jest obcą, niejeden nie wie o istocie rzeczy, jaką ta nazwa oznacza.

Tak jest do pewnego tylko czasu, gdyż niebawem jakiś zapalony przyjaciel zacznie niespodzianie opowiadać nam o rzeczy niesłychanej, cudownej, zadziwiającej, która wprawi w zdumienie cały świat, zainteresuje społeczeństwo itd. itd.

Narazie słucha go się z uśmiechem, z niedowierzaniem, starając się przerwać potok jego wymowy. Nic to nie pomaga... Ale powoli sam on uspokaja się i wsuwa nieznacznie w rękę swego cierpliwego słuchacza małą broszurkę.

Przyjaciele rozstają się z uczuciem pewnego politowania jednej strony, nad humanitarnymi dążeniami drugiej.

Czas upływa, a mała broszurka spoczywa w kieszeni palta aż do chwili, kiedy pewnego dnia odnajdujemy ją. Przerzuca się ją mimowoli — z nudów najczęściej — zaczyna zajmować.

Co to jest?

Czyta się dalej z zajęciem... Doprawdy, to genialna rzecz! Żadnych prawideł, wyjątków, mało słówek do nauki, nic prostszego nad naukę tego języka! Mimo to wszystko odkłada się książeczkę na bok i na razie nie myśli się więcej o tem.

Po upływie pewnego czasu czyta się w dzienniku opinię jakiego uczonego lub sprawozdanie z kongresu, zebrania, zabawy esperantystów i mówi się w duchu:

— Ależ to postępuje i rozwija się ten ich Esperanto. Trzeba będzie nauczyć się tego języka...

I powraca się do broszurki, wczytuje się w nią z zajęciem i z pewnem zadowoleniem konstatuje się, że umiemy powiedzieć:

— Bonan tagon, sinjoro!

Powoli nabiera się gustu do tej nauki, a chociaż z początku, po krótkiej chwili odkłada się broszurkę, to jednak nie na długo, bo mikroby Esperanta żyją w organizmie, wprawdzie nie wyrządzając mu krzywdy żadnej, ale tam tkwią i żyć będą.

Nie jesteśmy jeszcze esperantystami, ale nie jesteśmy już obojętni dla tego języka. Wystarczy jeno wówczas zapomocą Esperanta otrzymać jaką wskazówkę, przysługę lub zamówienie handlowe, aby z neofity stać się już wierzonymi jego wyznawcą i prowadzić apostołstwo idei.

Oto jak się stajemy esperantystami.

A jest to tylko jeden ze sposobów, jakie do tego prowadzą. Jedni zostają nimi po przeczytaniu artykułu na ten temat, inni wzięwszy udział w posiedzeniu propagacyjnem, inni jeszcze inaczej. Ale to jest pewnem, że w ten lub ów sposób w niedalekiej przyszłości każdy zostanie esperantystą. *H. K.*

## Opinie wybitnych francuzów o Esperancie.

(Ciąg dalszy.)

**Fryderyk Passy:** „Mogłem się niejednokrotnie przekonać o użyteczności tego języka w wielu wypadkach“.

**Marceli Prevost:** „Wprowadzenie języka powszechnego rzuci nowe światło na kwestję mowy ludzkiej i różności narzeczy. Żadna myśl, żadne pojęcie nie będą stracone“.

Pan **Justyn Godart**, deputowany z Rodanu: „Gdyby Esperanto narzucał się społeczeństwu z zamiarem wyrugowania wszystkich narzeczy, nie znalazłby uznania u żadnego osobnika z umysłem trzeźwym. Esperanto chce być prosto środkiem zbliżenia się tych, których język rozdziela, narzędziem praktycznym porozumiewania się, wiernym pomocnikiem cywilizacji i łączności międzynarodowej. Język ten jest i powinien pozostać łatwym do przyswojenia, dającym możliwość porozumiewania się między cudzoziemcami, zachęcającym

ich do wzajemnego poznania się, rozszerzającym widnokrąg umysłowy, ograniczony dotąd przez brak znajomości języków.

Przeciwnicy Esperanta w celu dyskredytowania nazywają go karykaturą innych języków, zlepkiem rozmaitych narzeczy, pomysłem fantasty i dziwaka. Ci, którzy tak utrzymują, nie znają Esperanta. Język ten przyswoił sobie pierwiastki od wszystkich plemion ucywilizowanych, zapożyczył od nich logiczne terminy, określające pewne pojęcia, idee, które są, że tak powiem, wyciągiem myśli. Esperanto powstał więc za współpracownictwem wszystkich języków.

Bezpodstawnem jest zatem niepokojenie się, że Esperanto robi konkurencję językowi, francuskiemu — przeciwnie należy rozważyć, czy nie będzie on cennym pomocnikiem języka francuskiego.

Esperanto ma wszędzie gorliwych adeptów; niejednokrotnie zbliżył on handlowców i przemysłowców dla ogólnej korzyści; połączył ludzi, którzy nie wiedzieli o swoim istnieniu, a Francja tylko na tem skorzystała. Zatem zamiast szykanować, trzeba uznać jego zasługi. Zresztą niech się mówi co chce, ale Esperanto posiada sam w sobie taką siłę propagandy, że żadne zarzuty nie są w stanie jej powstrzymać. Niedługo jutro pokaże, że Esperanto ma w sobie żywotną prawdę i że spotęguje on wielkość naszego kraju“.

Dr. G. Maillard, lekarz szpitala Salpetrière: „Esperanto i awiatyka, te dwie utopje dnia wczorajszego, te dwie niemożliwości, te dwa szalone pomysły, które do niedawna wywoływały tylko wzruszenie ramion i uśmiech ironiczny, są na drodze do udowodnienia największego postępu geniuszu ludzkiego“.

Oktawiusz Mirbeau: Cywilizacja dopóty nie posunie się szybkim krokiem naprzód, dopóki narody będą się posługiwały różnymi i nieprzyjaznymi językami, dopóki na całej ziemi nie zapanuje jeden jedyny język międzynarodowy.

## Parolo de D-ro L. L. Zamenhof

### Ĉe la malfermo de la Sepa Kongreso Esperantista.

Kiel tradicia malfermanto de la kongresoj esperantistaj, mi permesas al mi esprimi en la nomo de ĉiuj kongresanoj nian respektan kaj sinceran dankon al lia reĝa moŝto la reĝo Alberto por la granda honoro, kiun li faris al nia afero, prenante sur sin la protektantecon super nia kongreso. Mi esperas, ke mi esprimos la deziron de ĉiuj kongresanoj, se mi proponos, ke ni sendu telegrafe nian divergentan saluton al la regnestro de la lando, kies gastoj ni estas, kaj nian dankon al nia alta protektanto. Mi esprimas ankaŭ en la nomo de la kongresanoj nian koran dankon, al la urbestro de Antverpeno, kiu afable donis al ni sian helpon kaj moralan apogon. Fine mi esprimas nian koran fratan dankon al tiuj niaj belgaj samideanoj, kiuj tiel laboreme kaj zorge pretigis nian grandan feston.

Mi uzas ankaŭ la okazon de nia festo, por revoki en vian memoron la nomon de unu viro, kiu havas grandegajn meritojn en nia afero. La prelado Johann Martin Schleyer, kies nomo ĉiu el vi konas tre bone, la aŭtoro de Volapük, antaŭ nelonge festis la okdekjaran datrevenon de sia naskiĝo, kaj estus nepardoninde, se ni ne uzus la okazon de nia ĝenerala kunestado por esprimi al li tiujn sentojn, kiujn ni ĉiuj havas por li. Li estas la vera patro de la tuta internacilingva movado. Antaŭ li oni ankaŭ revis pri lingvo internacia oni provis labori por ĝi; sed tio estis nur teoriaj skizoj, palaj, senkorpaj fantomoj en la regiono de revoj. Li estis la unua, kiu diris

al si: por lingvo internacia mi volas ne revii, sed *labori*; dum ĉio ĉirkaŭe dormis, li estis unua, kiu praktike kreis la internacian *movadon*. Volapük ne estis venkita de Esperanto, kiel multaj personoj pensas tute erare; ĝi pereis *per si mem* en tiu tempo, kiam la trankvile kaj senartifike laboranta Esperanto estis ankoraŭ tro malforta, por iun venki; ĝi pereis ne pro sia stranga sonado aŭ pro aliaj similaj kaŭzoj, ĉar al ĉio oni povas alkiuti ĝi kaj kio hieraŭ ŝajnis sovaĝa, tio morgaŭ aperas kiel io tute natura kaj bela; per longa kaj multespeca uzado eĉ la plej sovaĝa idiomato de la plej barbara gento iom post iom fariĝas riĉa, eleganta kaj oportuna lingvo.

Volapük pereis ĉefe pro *unu* grava eraro, kiun ĝi bedaŭrinde enhavis: *absoluta manko de natura evolucipovo*; kun ĉiu nova vorto aŭ formo la lingvo devis konstante dependi de la decidoj de unu persono aŭ de facile inter si malpaconta personaro. Kiel sur bastono, plantita en teron, novaj branĉoj kaj folioj ne povis nature kreski sur ĝi, sed devis esti konstante skulptataj kaj algluataj. Se ne ekzistus *tiu* eraro, kiun korekti oni bedaŭrinde ne povis. Volapük neniam pereus kaj ni ĉiuj nun verŝajne parolus volapüke. Sed tiu bedaŭrinda eraro, kiun kaŭzis ne manko de talento kaj de laboremece, sed nur tro rapida publikigo de la lingvo, sen sufiĉe matura elprovado, — tiu eraro, kiu pereigis Volapükon, neniel malgrandis la meritojn de ĝia aŭtoro, kiu la unua potence skuis la mondon por nia ideo; la

grandaj meritoj de Schleyer en la internaci-lingva historio neniam malaperos.

Mi proponas al vi, ke okaze de la festo de Schleyer ni telegrafe sendu al li en la nomo de la tuta esperantistaro nian koran gratulon nian dankon por lia granda laboro kaj nian deziron, ke li vivu ankoraŭ longe kaj havu la konscion, ke la fruktoj de lia laboro neniam pereos.

Karaj amikoj! Mi staras hodiaŭ antaŭ vi ne esperinte. Ĉar dum la lasta tempo la stato de mia sano estis tro malbona, mi decidis ne veturi al la kongreso en ĉi-tiu jaro. Tamen en la lasta tempo mi devis ŝanĝi mian decidon, ĉar mi rimarkis, ke la projekto, kiun mi prezentis por diskutado dum la Sepa Kongreso, ne de ĉiuj estas ĝuste komprenita kaj eble bezonos klarigojn de mia flanko. Tial ne miru, ke mi ne prepariĝis paroli pri ia speciala temo, sed mi tuŝos nur per nemultaj vortoj tiun demandon, kies pridiskutadon dum la kongreso mi proponis al vi. Mi ne antaŭvenos vian decidon por aŭ kontraŭ la diskutota projekto, mi volas nur diri kelkajn ĝeneralajn vortojn, por instigi vin bone kaj senpartie prepariĝi por la venontaj diskutoj.

Ekzistas en nia afero demandoj, kiuj povas esti solvataj ne de iu aparta persono, ne de iu aparta nacia asocio, ne de iu aparta institucio, sed nur de la tuta esperantistaro; ekzemple la demandoj pri nia Lingva Komitato, Konstanta Kongresa Komitato k. t. p. Se iu volas fari simple konsilajn proponojn pri la interna agado de tiuj institucioj, li povas prezenti siajn proponojn al la estroj de la diritaj institucioj; sed se oni faras plendojn, se oni postulas reorganizon, anstataŭigon aŭ eĉ forigon de tiuj institucioj — tiam al kiu oni devas sin turni? Aŭ se aperas iaj demandoj, kiu koncernas la tutan esperantistaron, sed apartenas nek al la Lingva Komitato, nek al la Komitato de la Kongresoj, — tiam kiu havas la rajton ilin solvi? En sia privata esperantista vivo ĉiu persono aŭ grupo aŭ asocio estas kompreneble liberaj kaj povas agi kiel ili volas kaj povoscias; sed pri ĉiuj demandoj, duboj aŭ entreprenoj, [kiuj koncernas la tutan esperantan aferon, estas nepre necese, ke ni havu la eblon ĉiam scii la veran opinion aŭ deziron de la tuta esperantistaro. Esperanto ne estas ankoraŭ en tia feliĉa stato, ke ĉiu povu nur tiri el ĝi profiton, ne zorgante pri la bonstato de la afero mem: ni devas kaj dum longa tempo ankoraŭ devos propagandi ĝin, kreskigi

ĝin, defendi ĝin kontraŭ malamikoj; sed se ni ne havas la eblon regule interkonsiliĝadi, aŭ se niaj interkonsiliĝoj, farataj ne en orda parlamenta maniero, ne havos moralan valoron por la esperantistoj, ni similos organismon sen kapo kaj sen manoj, ni nenion povos entrepreni, ni staros senmove kaj malpacos inter ni mem.

Mi ne volas en la unua momento defendi la projekton, pri kiu vi en la plej proksimaj tagoj diskutos; tre povas esti, ke la projekto havas gravajn erarojn, kiujn via pridiskutado forigos; tre povas esti, ke la tuta projekto montriĝos neakceptinda, kaj tiam — vi scias tion tre bone — mi ne penos altrudi ĝin al vi kiel mi neniam ion al vi altrudis. Nur pri unu afero mi kore vin petas: kiom ajn vi decidis ni ne fermu nian kongreson antaŭ ol ni en tia aŭ alia formo faros ian aranĝon, kiu donos al ni la eblon, almenaŭ unu fojon en jaro solvi ĉiujn kolektiĝantajn disputojn aŭ dubojn en lojala interkonsento kaj konforme al la vera deziro de la tuta esperantistaro.

La aranĝo de regula kaj rajtigita kongresa voĉdonado, kiun mi proponis al vi, aŭ ia alia simila aranĝo, kiu eble rezultos el via diskutado, ne estos ia nova institucio kaj per si mem ne ŝanĝos la iradon de nia afero; sed ĝi donos al ni la forton de ordo kaj solidareco. La institucioj, kiujn ni kreis, aŭ eble ankoraŭ kreos, ĉesos havi la karakteron de ia privat aĵo, kiun neniu subtenas kaj multaj atakas. Il havos rajton diri al la esperantistaro: se ni estas bonaj, respektu nin kaj subtenu nin; se estas malbonaj, reorganizu nin aŭ forigu nin. Ĉiu esperantisto scios, al kiu plej alta instanco li devas sin turni, se tio aŭ alia en la komun-esperantistaj aferoj ne plaĉas al li, kaj oni ĉesos konstante sin turnadi al mi, kiu hodiaŭ vivas kaj morgaŭ povas ne vivi, kaj kiu cetere havas nek rajton, nek deziron solvi ĉiujn disputojn propradecide.

Ni komencu nian feston kaj ankaŭ niajn laborojn, al kiuj ni dediĉu nian plenan atenton kaj senpartiecon. Se el niaj laboroj rezultos la enkonduko de preciza ordo en nian aferon, tiam la kongreso Antverpena estos unu el la plej gravaj inter niaj kongresoj. Tion ni esperu. Ĉiu el ni havu la firman decidon helpi per ĉiuj fortoj al la enkonduko de ordo kaj forigo de ĉiu malpaco en nia afero. Kun tiu firma kaj solena decido en la koro ni krii:

Vivu, kresku kaj floru, nia afero!

## Mia fianĉigo.

(El „La Tria“ de H. Sienkiewicz.)

Venas la tago de mia fianĉigo.

Mi aĉetis belegan ringon laŭ la stilo Louis XV, kiu ne plaĉis al Suslowski kaj eĉ al Kazia, ĉar en la tuta domo neniu komprenas ion pri la vera arto.

Je Kazia mi devas ankoraŭ multe labori, por ekstermi en ŝi la burĝajn inklinojn kaj instrui ŝin senti artiste; sed ĉar ŝi min amas, mi havas bonan esperon.

Al la fianĉigo mi invitis neniun, krom Swiatecki. Mi volis, ke li vizitu antaŭe gesinjorojn Suslowski, sed li asertas, ke kvankam li estas fizika kaj morala bankrotulo, tamen li ne malnobliĝis ankoraŭ ĝis tia grado, por fari vizitojn... Nenio helpas.

Mi preparis gesinjorojn Suslowski antaŭe, ke mia amiko estas eksterordinara strangulo, sed cetere genia pentristo kaj la plej honesta homo en la mondo.

Suslowski sciiginte, ke mia amiko pentras „kadavrulojn“, „kadavrulinojn“ kaj „kadavrulidojn“, levas la brovojn, deklaras, ke ĝis nun li havis rilatojn kun homoj decaj, ke lia tuta oficista kariero estis senmakula kaj ke li havas la esperon, ke „sinjoro Swiatecki“ bonvolos respekti la kutimojn, regantajn en honesta kaj modesta domo...

Mi konfesas, ke en tiu rilato mi ne estas libera de timo, kaj jam de la mateno mi militas kun Swiatecki. Li obstinas, ke li iros, havante la pantalonduonojn en la botoj. Mi persvadas, petas, petegas.

Fine li konsentas, sciigante, ke cetere li ne vidas motivon, pro kio li ne devus fariĝi arlekeno. Domaĝe, ke liaj botoj memorigas botojn de esploristoj el meza Afriko, ĉar la ciro ne tuŝis ilin de la momento, kiam oni ilin alportis kredite de la botisto. Kion fari!

Pli malbone estas, ke la kapo de Swiatecki aspektas kiel monta supro, kovrita de arbaro, kiun trakuris ventego. Koncerne tion mi devas konsenti, ĉar ne ekzistas en la mondo strig-

ilo, kiu estus kapabla trakombi tiun-ĉi hartufon, sed anstataŭe mi devigas Swiatecki, ke li almenaŭ ne vestiĝu en bluzon, kiun li portas ĉiutage, sed surmetu surtuton. Li faras tion, sed ĉe tio li havas la mienon de unu el siaj „kadavruloj“, kaj samtempe lin ekregas tomba humoro.

Sur la stratoj la homoj turnas sin por rigardi lian tuberan bastonegon kaj la grandegan ĉikaŭŝiritan ĉapelon, sed al tio mi jam kutimiĝis.

Ni sonoretas kaj eniras.

Jam en la antaŭĉambro atingas min la voĉo de la kuzo Jaczkowicz, diskutanta pri troloĝateco. La kuzo Jaczkowicz konstante diskutas pri tropopoligo, tio estas lia saĝeco. Kazia aspektas en siaj muslenoj kiel nubeto kaj estas bel-ega... Suslowski en frako, la parencoj en frakoj, la maljunaj onklinoj en siaj silkaj roboj.

La eniro de Swiatecki faras impreson. Oni observas nin iom maltrankvile... Li rigardas malserene ĉirkaŭen kaj deklaras al Suslowski, ke certe li ne altrudus sin, „se ne estus tio, ke Wladek edziĝas, aŭ faras io simila“...

La „ion similan“ estas akceptita plej fatale. Suslowski rektiĝas digne kaj demandas, kion sinjoro Swiatecki komprenas per „ion similan“...

Sinjoro Swiatecki respondas, ke tio estas por li tute indiferenta, sed ke „por Wladek“ li povus sin eĉ ŝmiri per lako, precipe se li scius, ke tio ne estas indiferenta por Suslowski...

Mia estonta bopatro rigardas la edzinon, min kaj Kazia'n per okuloj, en kiuj la mirego vetbatalas kun la skandaliĝo.

Feliĉe mi savas la situacion, kaj nekonzultite, mi petas la estontan bopatron, ke li prezentu min al la familianoj, kiujn mi ankoraŭ ne konas...

Komenciĝas la prezentado, poste ni sidiĝas.

Kazia sidiĝas apud mi kaj lasas sian manon en la miaj. Mia Swiatecki rigardas sub la tablon...

En la mallaŭto etendiĝas ĉiam pli laŭte la voĉo de Jaczkowicz, kiu, ne havante antaŭan denton, ĉie, kie li devas elparoli „ŝ“, faras longan fajfon...

— Tio povas kaŭzi iam la plej terurajn malfeliĉojn por la tuta Eŭropo — diras Jaczkowicz.

— Elmigrado... — iu diras flanke.

— La statistiko pravas, ke la elmigrado ne malebligas la tropopoligon.

Subite Swiatecki levas la kapon kaj turnas siajn fiŝajn okulojn al la parolanto.

— Do oni devas enkonduki ĉe ni ĥinajn kutimojn — aŭdiĝas lia malserena baso.

— Permesu... kion, ĥinajn kutimojn?

— Ĉar en Ĥinujo gepatroj havas la rajton sufoki maltaŭgajn infanojn — do infanoj ĉe ni devus havi la rajton sufoki maltaŭgajn gepatrojn.

Fariĝis! La fulmo ekbatis, la kanapo ekĝemis sub la onklinoj, kaj mi pereis. Susłowski fermas la okulojn, perdas por kelka tempo la parolkapablon.

Silento.

Poste etendiĝas la tremanta pro teruro voĉo de mia estonta bopatro:

— Mia sinjoro, mi esperas, ke, kiel kristano...

— Kial do mi devas esti kristano? — interrompas Swiatecki, balancante malbonaŭgure la kapon.

Dua fulmobato! La kanapo kun la onklinoj komencas skuiĝi kiel en febro, kaj falas en abismon... Mi sentas, ke sub mi ankaŭ la tero malfermiĝas.

Ĉio estas perdita, ĉiu espero vana!

Subite eksplodas, bonsone kiel sonorileto, la rido de Kazia, post ĝi eksplodas per rido, ne sciante kial, Jaczkowicz, post Jaczkowicz eksplodas mi, ankaŭ ne sciante kial...

— Paĉjo! — vokas Kazia. — Wladzio antaŭsciigis vin, ke sinjoro Swiatecki estas tre originala... Sinjoro Swiatecki ŝercas, kaj mi scias, ke sinjoro Swiatecki havas patrinon kaj estas por ŝi la plej bona filo!

Jen sagaca knabino estas Kazia! Ne nur ŝi elpensas, sed ankaŭ divenas, ĉar Swiatecki efektive havas patrinon kaj estas por ŝi plej bona filo.

Ŝia rido kaj la diritaj vortoj faras iom

da distro. Ankoraŭ pli grandan distron faras la eniro de lakeo kun vino kaj kuketoj. Tio estas la dom-gardisto, kiu oni vestiŝ en frakon kaj li prezentiĝas nun okaze kiel lakeo. La okulojn li estas fiksinta en la pleton, la vitraĵo tintas, kaj li moviĝas antaŭen tiel malrapide, kvazaŭ li portus glason plenan de akvo.

Mi komencas timi, ke li ĉion faligos teren; sed feliĉe mia timo montriĝis vana...

Post momento la kalikoj estas plenigitaj.

Ni alpaŝas al la fianĉiga ceremonio...

Neplenaĝa kuzino tenas porcelanan teleron, sur kiu kuŝas du ringoj. Ŝiaj okuloj eliĝas pro sciemo kaj la tuta ceremonio faras al ŝi tiel evidentan ĝuon, ke ŝi eĉ supren-saltetas kune kun la telero kaj la ringoj.

Susłowski leviĝas, ĉiuj stariĝas, kaj oni aŭdas la bruon de la forŝovataj seĝoj.

Fariĝas silento. Mi aŭdas, kiel unu el la matronoj faras flustre la rimarkon, ke ŝi esperis, ke mia ringo estos „pli deca...“ Malgraŭ tiu rimarko, la agordiĝo estas tre solena.

Susłowski havas la parolon:

— Miaj infanoj, akceptu la benon de la gepatroj...

Kazia ekĝenuas, ekĝenuas ankaŭ mi...

Kian mienon havas tiu-ĉi Swiatecki en tiu-ĉi momento, kian mienon li havas!?

Sed mi ne kuraĝas lin ekrigardi. Mi rigardas la muslinan robon de Kazia, kiu sur la kolorperdinta ruĝa tapiŝo formas tre belan makulon. La manoj de Susłowski kaj de sinjorino Susłowska apogiĝas sur niaj kapoj, poste mia estonta bopatro parolas:

— Mia filino! vi havis la plej bonan ekzemplon en nia domo, kia devas esti la edzino por la edzo, do mi ne bezonas instrui vin pri la devoj, kiujn cetero la edzo al vi indikos (tion mi esperas!)... Sed mi turnas min al vi, sinjoro Vladislavo...

Tie-ĉi komenciĝas paroladeto, dum kiu mi kalkulas ĝis cent, kaj kalkulinte ĝis cent, mi rekomencas de unu. Susłowski civitano, Susłowski oficisto, Susłowski patro, Susłowski Romano havas

okazon montri la tutan grandecon de sia animo... Vortoj: infano, gepatroj, devoj, estonteco, beno, dornoj, pura konscienco — zumas ĉirkaŭ miaj oreloj kiel aro da vespoj, ĉirkaŭsidiĝas mian kapon, pikas miajn suprecititajn orelojn, la kolon kaj la frunton...

Mi havas verŝajne la kravaton tro forte kunligitan, ĉar mi preskaŭ sufokiĝas. Mi aŭdas la ploron de sinjorino Susłowska, kiu min kortuŝas, ĉar ŝi estas sendube honesta virino, mi aŭdas la tintadon de ringoj, tenataj sur telero per la supren-saltetanta kuzino. Kristo-Sinjoro! kian mienon tiu-ĉi Swiatecki nun havas!?

Fine ni stariĝas. La kuzino ŝovas la teleron ĝis miaj okuloj. Ni interŝanĝas kun Kazia la ringojn...

Uf! mi estas lacigita! Mi pensas, ke ĉio finiĝis, sed ne, ĉar Susłowski alvokas nin, ke ni iru peti pri la beno ĉiujn onklinojn.

Ni iras. Mi kisas ĉirkaŭ kvin manojn similajn al cikoniaj piedoj... Ĉiuj onklinoj esperas, ke mi ne trompos ilian fidon.

Kian fidon, je diablo, ili povis havi al mi? La kuzo Jaczkowicz ĉirkaŭprenas

min. Tute certe mia kravato estas tro forte kunligita...

Sed la pleja malbono pasis. Malhelheliĝas... Oni enportas la teon.

Mi sidas apud Kazia kaj mi ĉiam ŝajnigas, ke mi ne vidas Swiatecki'on. Li, simio, maltrankviligas min ankoraŭ unufojon, kiam li, je la demando, ĉu li ne enverŝos en la teon iom da arako, respondas, ke da arako li trinkas kutime nur botelojn... Cetere la vespero finiĝas feliĉe.

Ni eliras. Mi enspiras per plena brusto la aeron. Efektive mia kravato estis tro forte kuntirita.

Ni iras kun Swiatecki silentante. Tiu-ĉi silentado fariĝas por mi tro peza kaj fine netolerebla. Mi sentas, ke mi devus ekparoli al Swiatecki, diri al li ion pri mia feliĉo, pri tio, kiel belege ĉio okazis kaj kiel mi amas Kazia'n... Mi prepariĝas, sed ne povas tion fari! Fine, jam proksime de laborejo, mi diris:

— Konfesu, Swiatecki, ke tamen la vivo estas iafoje bela.

Swiatecki haltas, ekrigardas min malserene kaj diras:

— Pudelo!

Dum tiu-ĉi vespero ni plu ne interparolis. *Trad. A. Grabowski.*

## La Entuziasmo.

(Fino.)

*Bacon*, havante apenaŭ 16 jarojn, kun tia entuziasmo studis filozofion, ke li povis jam montri diversajn mankojn de filozofio de Aristoteles.

*Canova* skulptis jam en argilo, kiam li eĉ estis ankoraŭ infano.

Neniu angla poeto povis egaliĝi per talento kaj entuziasmo kun *Tomaso Chatterton*, kiam li nur havis 21 jarojn.

*Cowley* eldonis la volumon de siaj entuziasmaj poezioj en 16-a vivjaro.

*Gladstone* havis apenaŭ 23 jarojn, kiam, dank' al liaj talentoj kaj entuziasmo, oni elektis lin kiel deputato al la parlamento.

*Goethe* skribis tragediojn jam en 12-a jaro de sia vivo.

*Viktoro Hugo* ankaŭ skribis tragedion, kiam li havis apenaŭ 15 jarojn. Krom tio li

ricevis 3 premiojn de l' Akademio kaj la titolon de Majstro, ne havante eĉ 20 jarojn.

*Luther*, triumfis kiel reformisto, havante nur 25 jarojn.

*Mozart*, kiam li apenaŭ havis 4 jarojn, ludis sur fortepiano kaj komponis menuetojn kaj ankaŭ aliajn muzikverkojn.

*Napoleono*, dank' al sia entuziasmo, jam en 25-a jaro de l' vivo venkis Itallandon.

*Newton* faris kelkajn plej grandajn inventojn kiam li ankoraŭ ne havis eĉ 25 jarojn.

*Tennyson* skribis la unuan volumon de siaj poezioj, havante apenaŭ 18 jarojn.

*Rafaelo*, eble la plej granda pentristo de la spirita beleco kaj *Ticiano*, la plej brila pentristo de la fizika beleco, ambaŭ estis, dank' al entuziasmo, egale junaj, malgraŭ tio, ke Rafaelo mortis en 37-a jaro de l' vivo kaj

ke la vivon de Ticiano tratanĉis la pesto, kiam li havis 100 jarojn!

Tamen multe da plej eminentaj geniuloj ne ĝisvivis eĉ 40-an jaron.

Sed neniu plena de l' entuziasmo kaj eĉ genia junulo, havis antaŭ longa tempo tian okazon, kiam li havas hodiaŭ. Nuna tempo — estas jarcento de junuloj. La entuziasmo estas por ili krono, antaŭ kiu la indiferentaj kaj la dormemaj kliniĝas fruntojn.

Sed se la entuziasmo estas tiel ne venkebla en la juneco, kiel ĝi estas ankoraŭ pli forta, kiam ni ĝin konservas ĝis maljuna aĝo!

Kaj vere! Ne kalkulebla estas la nombro de ĉi-tiuj eminentaj homoj, kiuj egale en la maljuneco estis ĉiam plenaj de entuziasmo.

Jen ekzemple — 75-jara *Arĥimedeso* kun tia entuziasmo laboris por matematiko kaj tiel estis absorbita per la solvo de la problemo, kiun li desegnis sur la sablo, ke li eĉ ne sciis, ke roma armeo okupis Sirakuzon. Do kiam alsaltis al li, kun la eltirita glavo roma soldato, Arĥimedeso montrante sur la designitaj figuroj, ekkriis:

— Haltu momente! lasu al mi la vivon nur tiel longe, ĝis mi solvos tiun ĉi problemon!

Sed la barbara militisto tratanĉis la vivon de la plej granda homo de tiuj tempoj.

Ne malpli de Arĥimedeso plena de entuziasmo, eĉ en la 77-a jaro de sia vivo, granda *Galileo*, kvankam li jam estis blinda kaj malforta — tre, tre laboris ĉiutage, penante apliki la principon de la pendolo al la horloĝo.

Alia bone konata scienculo, *Aleksandro Humboldt*, lernis ĉiam entuziasme preskaŭ ĝis la lasta spiro kaj finis sian gloran „Kosmos'on“ je unu monato antaŭ la morto, en 90-jara de sia vivo.

D-ro *Samuelo Johnson* skribis sian plej bonan verkon: „Biografioj de la plej eminentaj Anglaj Poetoj“ kiam li havis 70 jarojn.

*Ludovico* skribis la rememorojn de siaj tempoj en la 115-a jaro (sic!) de sia vivo.

— Mi ne ve-plendas je la volon de la ĉielo — parolis *Johano Milton*, kiam li estis blinda, maljuna kaj malriĉa — mi ne ve-plendas, ĉar tute nun ne malgrandiĝis mia entuziasmo, mia kuraĝo kaj mia espero. Kontraŭe. Mi iras ĉiam al mia celo rekte kaj antaŭen!

Jes. Ne frostigis lin eĉ la malvarmo de la tempo, en kiu li priskribis la amon de la unua paro en paradizo.

Al multaj aliaj eminentaj homoj, kiuj ĝis-

vivis tre malfruan aĝon kaj distingiĝis per entuziasmo, apartenas ankoraŭ ekzemple:

*Izaako Newton*, kiu skribis novajn mallongigojn al siaj „Principoj“ en 83-a jaro de la vivo.

Granda filozofa *Platono*, kiu mortis, skribante senĉese en 81-a jaro de sia vivo.

Gloraj angla sciencistino *Mario Somerville*, kiu finis sian grandvaloran verkon „On the molecular and microscopic sciences“ (1869), kiam ŝi havis 89 jarojn.

*Tomaso Scott*, kiu komencis la studojn de la lingvo hebrea, havante jam 85 jarojn.

*Jakobo Watt*, kiu lernis la lingvon germanan en 85 jaro.

Tiaj eminentaj poetoj, kiel: *Longfellow*, *Tennyson* kaj *Whittier*, kiuj kreis siajn plej belajn verkojn, kiam ili havis jam sepdek jarojn.

Kaj kiel potenca estis ankoraŭ en 81-a jaro de sia vivo — la kanceliero *Bismarck!*

Kiel estis brava la venecia doĝo *Dandolo*, kiu kelkfoje venkis en la bataloj, kiam li estis preskaŭ tute blinda kaj havis jam 94 jarojn!

Ankaŭ *Viljamo Gladstone* en la 80-a jaro havis dekfoje pli da povo, signifo kaj potenco, ol povus ilin havi kia ajn junulo, kun la samaj kapabloj, en la 21-a jaro de l' vivo. Eksterordinara fervoro kaj entuziasmo de Gladstone ĉiam havis revivigan influon sur liajn kolegojn, kiel ekz.:

La lordo *Henriko Palmerston*, kiu estis nomita duafoje la ministro-prezidanto en 75-a vivjaro kaj mortis ankaŭ sur tiu sama plej alta posteno en 81-a jaro de sia vivo.

Rememorigu al ni fine, ke ankaŭ *Wellington* pripensis la planojn kaj inspektis la fortifikigojn, kiam li jam havis 80 jaran aĝon.

Sekve, la gloro de tiaj homoj estas nur la gloro de ilia entuziasmo kaj la estimo por iliaj blankaj haroj estas sole la adoro por iliaj varmegaj koroj.

Sekve, dank' al entuziasmo ni povas konservi ĝis grizaĵo kaj tre malfruaj jaroj ankaŭ la freŝecon de la menso.

Sekve ĉiuj supre cititaj faktoj estas nerefuteblaj argumentoj de entuziasmo, kiu, kiel ni vidas, ne forlasas grandajn virojn eĉ en ilia maljuneco. Kaj laŭvere! juste ie oni diris:

— La blankaj haroj estas nur la ŝaumo, kiu kovras la maron post la ventego...

El *Orisson Svett-Marden*  
tradukis

*Aleksander Bolesław Brzostowski.*



## La plej mizeraj homaj estajoj.

La plej sovaĝa, aŭ ĝuste la plej primitiva popolo sur la tero estas nun la gento Kubu. Ĝi loĝas en interno de arbaroj sur la granda insulo Sumatra, troviĝanta sud-oriente de Azio, ĝuste ĉe ekvatoro (Sunda arĥipelago: Borneo, Celebes, Java kaj Sumatra).

La gento Kubu disfalas en du diversajn, tre diferencajn subgentojn. Unu el ili estas nomita Orang-Kubu, ĝi konfesas plejparte mahometanan religion kaj okupas sin je terkulturo. La sovaĝa subgento Kubu vivas vagante en netrapenetreblaj arbaroj en la suda parto de la insulo.

Lastatempe holanda vojaĝanto von Kempen sukcesis kun granda malfacilo kaŝe observi kaj ekkoni kelkajn detalojn el la vivo de ĉi-tiuj homaj estajoj, tre malmulte diferencaj de bestoj.

Konstantajn loĝlokojn ili ne havas. En malgrandaj grupoj, kunligitaj de familiaj nodoj ili vagas tra la arbaregoj. Por nokto ili rifuĝas en kavernoj aŭ alligas sin per lianoj al arboj.

Nur unufoje Kempen vidis la familion de Kubu, kiu sub ia kvazaŭ tegmento el kunmetitaj branĉoj — serĉis rifuĝon dum la pluvo. Krom tio li rimarkis nenian signon de konstru-arto.

La subgento Kubu estas malalt-kreska kaj terure malbelega. La mens-kapabloj eĉ ne povas egaliĝi kun inteligenteco de kelkaj bestoj.

Ilia vesto konsistas el pecetoj de arboŝelo, alligitaj en kruda stato ĉirkaŭ lumboj. La solaj iliaj armiloj estas longaj pintigitaj branĉoj. Pafarko kaj sago estas nekonataj, egale kiel ornamaĵoj, dom-bestoj kaj utililoj. La sola

celo de ilia vivo kaj akceloj estas serĉado de manĝaĵo. Ili manĝas ĉion, kio estas iel kaj iom manĝebla. La viandon ili manĝas nekuiritan. Kiel frandaĵon ili ŝatas ian specon de viperoj.

La ideo de propreco ĉe ili ankaŭ ne ekzistas. Ili havas nenian ideon pri ia organizita forto, pri estrado. La edziĝoj okazas ĉe ili sen ia ajn ceremonio, sen ia ajn formo. La maturiĝantaj infanoj vagadas kun aro kaj naskigas novajn. Kempen rimarkis ĉe Kubu nek ian religian kulton aŭ eĉ nek superstiĉojn. Ĉe ili estas fremda ĉia kulto. Ne ekzistas eĉ ceremonioj enterigaj, kiujn oni renkontas eĉ ĉe la plej primitivaj popoloj de centra Afriko. Kiam Kubano mortos, oni lasas lin tie, kie li kuŝis aŭ falis.

La vagantaj aroj ne militas inter si. Kiam ili envoje renkontiĝas, ili preterpasas indifere, sen salutoj, sen demandoj.

Personoj fremdaj, precipe eŭropanoj vekas en Kubanoj teruran timon — ili forkuras. Post multaj malsukcesaj atendoj Kempen sukcesis embuske observi aronda sovaĝuloj. Celante esplori parolmanieron, de Kubu, la holanda esploristo kaptis unu Kubanon. Sed vane: sovaĝulo nur tremis, sed ne eligis eĉ unu silabon. Kiam Kempen volis lin fotografi kaj direktis sur lin la aparaton, Kubano ekkriis de teruro, elŝiris sin el manoj de gardisto kaj forkuris.

Ĉiaj penoj de holanda registaro por ĉi-tiu genton kolonizi, restis vanaj. Kubu posedas tro malmulte kapablojn por sistema, ĉela laboro.

M.

## Echa pokongresowe.

**W imieniu polskich esperantystów przemawiał na posiedzeniu otwarcia Kongresu prezes Polskiego Tow. Esperantystów, p. Antoni Grabowski, rozpoczynając przemówienie temi słowy:**

„Wielkie dzieła nie starzeją się: pozostają wiecznie świeże i młode; wielkie uczucia nie słabną: zachowują one swoją siłę i potęgę. Już kilkakrotnie miałem zaszczyt i szczęście witać nasze kon-

gresy w imieniu moich polskich ziomków, lecz zawsze czynię to to z tem samem głębokiem wzruszeniem.“

Przemówienie to p. Grabowski zakończył następującym powitalnym wierszem, wywołując burzę oklasków.

Samideanoj —  
 Akce, tu vi  
 Korajn salutojn —  
 El Varsovi!  
 Akceptu ilin,  
 Poste en mond'  
 Disportu ĉie  
 Al nia rond'  
 =  
 Diru, ke ankaŭ  
 Sur pola ter'  
 Batas la koroj  
 Per la esper';  
 Ke ankaŭ tie,  
 Apud Vistul',  
 Ĉe ĝia sono  
 Brilas okul',  
 Kaj etendiĝas  
 Amika man',

Sonaŝ: „Bonvenu,  
 Samidean'!“  
 =  
 Kvankam la nokto  
 Ĉirkaŭas nin,  
 Ni kredas: Tago —  
 Brilos en fin';  
 Leviĝos fine  
 Ora la sun',  
 Kie la steloj  
 Briletas nun;  
 Ektondros laŭte  
 Triumfa kant'  
 Pri fina venko  
 De l' Esperant'!  
 Do mi nur preĝas:  
 Ho, donu Di',  
 Ke tiun kanton  
 Ekaŭdu ni!

**Cechą znaną** tylko co przebrzmiałego kongresu było akcentowanie tak zw. „*fideleco*“ — wierności esperantystów dla języka Esperanto, takiego, jakim go stworzył i na użytek ludzkości oddał mistrz, dr. Ludwik Zamenhof. W przemówieniach, dyskusjach i w ogóle przy każdej okazji dawały się wyczuwać tendencje przeciwne t. zw. „reformom“, które, jak wykazało doświadczenie, były tylko nieudolnym parodjowaniem Esperanta, tego dojrzałego tworu geniusza, który w swoim „fundamento“ dał niewzruszone, granitowe, logiczne zasady samodzielnego rozwoju Esperanta; natomiast wszelkie „reformy“ i secesje od tych zasad mogą jedynie zrujnować tę genialną budowę.

Do ni restu fidelaj! — Więc pozostajmy wierni!

**Wręczenie orderu.** Była prawdziwie wzruszająca chwila, kiedy na inauguracyjnym posiedzeniu Kongresu, delego-

wany króla hiszpańskiego, kapitan Perregordo, oznajmiwszy, że Jego Królewska Mość Alfons XIII polecił mu wręczyć order Izabelli Katolickiej — twórcy Esperanta, powstał i ozdobił szyję d-ra Zamenhofa pomienioną ozłoką.

Śmiało rzec można, że dr. Zamenhof, dotychczas kawaler Legji honorowej (Francja) i komandor Izabelli Katolickiej (Hiszpanja), za lat kilka będzie się mógł poszczycić całą kolekcją orderów, którymi odznacza się ludzi, zasłużonych dla społeczeństwa.

Sądzymy jednak, że dla Mistrza najpiękniejszą ozdobą będzie skromna zielona gwiazdka, symbol nadziei, która zawsze nim kierowała i była jego przewodniczką wśród tysiąca przeszkód i trudności, jakie stawały na drodze do obecnych świetnych wyników.

**W Handlu Antwerpskim.** — Podróżni, wysiadający na dworcu centralnym w Antwerpii, byli niezmiernie zdziwieni, widząc niezliczoną ilość sztandarów esperanckich, powiewających na licznych domach i sklepach i czytając na licznych szyldach napisy: „Firmo rekomendata“, „Oni parolas esperante“ itp.

Bo istotnie liczni są handlowcy w Antwerpii, interesujący się językiem pomocniczym, zapewniającym im tyle różnorodnych korzyści. Najlepszym tego dowodem są słowa dziennika „Metropol“: „Jakikolwiek będziemy mieli zdanie w kwestji Esperanta, to trzeba jednak przyznać, że było zjawiskiem niezwykłym to zebranie dwóch tysięcy osób różnorodnych narodowości, przybyłych ze wszystkich stron świata, a rozumiejących się doskonale przy pomocy sztucznego neutralnego języka.

Nadto nie możemy tu pominąć strony praktycznej. Zaznaczyć musimy, że esperantyści, którzy należeli przeważnie do klasy zamożniejszej, pozostawili w mieście przynajmniej pół miliona franków

Fakt ten polecamy uwadze organizatorów VIII-go Kongresu w Krakowie. Niech go opowiedzą komu należy.

**Przyszłe Kongresy** odbędą się: w r. 1912 — w Krakowie, w r. 1913 — w Genewie, w r. 1914 — w Paryżu.

## Ĉu esperantistoj estas fidelaj al esperantismo?

Per tiu-ĉi stranga demando alparolis min antaŭ nelonga tempo neesperantisto, kiun mi penadis gajni por Esperanto. Mi devas konfesi, ke tiu senpera demando min iom konfuzis, kaj mi donis iom eviteman respondon, ĉar mi ne volis — mensogi. Sed nun, alparolante vin, samideanojn, mi volas forlasi mian antaŭan kaŝemon, esperante, ke, se vi konsentos kun mia opinio, tiuj-ĉi linioj ne restos senefikaj kaj, se vi ne konsentos, mi povos des pli ĝoji pro mia ne ĝusta, pesimista opinio.

Neniu logike pensanta homo faras iun gravan paŝon sen motivoj. Tial mi pensas, ke ankaŭ neniu fariĝis esperantisto sen motivoj, kaj aldonu ni tuj, sen gravaj motivoj; ĉar bataladi por nova afero, por kiu la plej multaj homoj ne havas intereson, aŭ sentas kontraŭ ĝi blindan antaŭjuĝon, bataladi por afero, por kies utileco ne nur grandamaso de popolo, sed grandparte eĉ registaroj, scienculoj kaj ĉiuspecaj eminentuloj ne havas sufiĉan komprenon, estas sendanka, senprofita, oferojn kaj idealan kuraĝon postulanta tasko. Tial ni konkludas, ke la ĉefa motivo de via laboro por Esperanto kaj esperantismo estas via interna konvinko pri tio, ke vi batalas por alta, homara kaj praktika celo, ne atendante profitojn aŭ honorojn por vi mem.

Se vi tiun vidpunkton aprobas, estas ankaŭ tuj klaraj ĉiuj necesaj agadoj por apogi esperantan movadon.

Kiam vi iam malsaniĝis kaj prenis laŭ kuracista konsilo ian medikamenton, vi certe ne atendis vian tujan resaniĝon post la engluto de kelkaj piloloj. La naturo aŭ sorto provizis nin je multegaj mankoj kaj eduko, kutimo, klara antaŭjuĝo aŭ vivbatalado ankaŭ fuŝis nin iom. Ĉu Esperanto aŭ esperantismo povas esti tiom sorĉaj piloloj, kiuj nin tuj resanigos kaj liberigos de mankoj, kiujn centjaroj naskis?

Esperantistaro konsistas el homoj diferencaj je deveno, okupo, eduko, moroj, kutimoj, socia pozicio ktp. Ne postulu ni unu de alia, ke iu sin aliigu laŭ nia kaprico aŭ persona opinio. Akomodu ni nin, havante ĉiam grandegan taskon antaŭ okuloj kaj tiam ni povos ĉiam kune labori sen perdo de la propra forto.

Esperanto kaj esperantismo ekzistas nek por iuj klasoj, nek por riĉuloj aŭ malriĉuloj, nek por profesoroj aŭ laboristoj, nek por aristokratoj aŭ socialistoj, nek por religiuloj aŭ liberpensuloj. Esperantismo devas ekzisti por ĉiu nobla, honesta homo.

La ĉiutaga vivo donas al ni pli ol sufiĉe la okazon akre batali por nia personaj aferoj, la ĉiutaga vivo plenigas pli ol sufiĉe niajn animojn per ĉagreno, malĝojo, kolero, malamikeco, envio kaj egoisma sento. Lasu ni al Esperanto, tiu-ĉi plej juna kaj plej bela infano de nia plej nobla sento, ĝian idealan aspekton ĝian puran veston. Oni ja diras, ke ĉiu homo devas havi iun strangajon, iun frenezeton. Estu por ni esperantistoj Esperanto kaj esperantismo nia nobla frenezeto kaj lasu ni al niaj posteuloj serĉi pli justan nomon por ĝi, pli justan prijuĝadon de nia laboro.

Sed ne sufiĉas konsideri por kio ni laboras; ni nepre devas al ni ĉiam klarigi, per kio ni volas atingi la celon. Nia ilo estas kaj estos lingvo esperanta, sen kiu ni nek unu paŝo alproksimiĝos al nia celo, al realigo de esperantismo. Ĉu tiu-ĉi opinio povas esti alia ĉe iu esperantisto. Certe ne. Kaj tamen estas multaj, tre multaj inter ni, kiuj lerninte iom Esperanton, eble tiom, ke ili povas kompreni pli facilan legadon aŭ skribi kelkajn poŝtkartojn (ofte erarplene), opinias, ke tia scio sufiĉas por nia grandega tasko. Tute malprave. Sukceson por nia ideo, por niaj celoj ni povas nur tiam esperi, kiam ni mem al homoj pruvos, ke nia afero estas matura, ke ni mem estas spirite maturaj por realigi niajn celojn en praktika vivo unuvorte, kiam ni pruvos, ke nia lingvo estas vivanta kaj ni flue ĝin parolas. Tion ni povas atingi nur per pli regula kaj diligenta vizitado de niaj diversaj kunvenoj, parolante en ili ĉiam esperante.

En niaj ĉiutagaj okupoj kaj niaj fakoj ni ja ne volas resti fuŝuloj, nu, tiam ni ankaŭ ne restu fuŝuloj rilate al afero, al kiu ni alportas la plej idealan oferon de nia koro kaj animo!

*Dresdenano.*

(El „*Germ. Esper.-Gazeto*“.)

## † Siegfried Lederer.

En Praha mortis profesoro Siegfried Lederer, redaktoro de „Rund um die Welt“ kaj ĉefa kunlaboranto de „Universo“. Kun ĉi-homo eniras en la tombon granda energio kaj senlaca laboro por nia kara afero. Li staris en la unua vico de plej sindonaj batalantoj por Esperanto.

Lia subita morto kovras per funebro la germanlandajn samideanojn kaj ankaŭ tutan esperantan mondon. Eterna memoro por li!

## Scienco kaj vivo.

### La Palaco de paco en Hago.

La ideo pri homara kunfratiĝo kaj pri komuna paca laboro de popoloj trovas originalan kaj kortuŝantan esprimon en la projektata konstruo de „Palaco de paco“ en Hago. Por konstruo oni decidis uzi la materialojn pleje karakterizantajn la industrion de ĉiu lando. Francujo alsendas artaĵojn, Ameriko — multekostan lignan materialon, Skandinavaj landoj — graniton, Aŭstrio — kristalaĵojn, Rusujo — vazojn orajn kaj jaspisajn, Germanujo — pordojn el forĝita fero, Japanujo — silkajn materiojn, Anglujo — mondkonatajn vitrojn k. t. p.

### Kiom da brando trinkas Rusujo?

Laŭ oficialaj statistikaj ciferoj de la 1-a de Januaro ĝis majo de k. j. — en la daŭro de la unuaj kvar monatoj oni trinkis en Rusujo 27,930,162 siteloj da

brando; tio rezultas, ke jara konsumado de brando egalas 87.790,486 sitelojn t. e. 2,094,762 kvardeksitelaĵojn ba-reloj.

Se oni kolektus ĉi-tiun brandon en unu loko kaj enverŝus ĝin en la speciale fositan kanalon — ni ricevus kanalon 15 arŝinojn larĝan, 1½ arŝ. profundan kaj 419 verstojn longan.

Se kunverŝi brandon, kiun trinkas Rusujo dum kvin jaroj, ni ricevus samlarĝan kaj profundan kanalon, sed de tia longeco, ke oni povus interligi per ĝi marojn Baltikan kun Nigra. En ĉi-tiu kanalo povus libere preterpasadi vaporŝipoj, similaj kiel veturas sur la Volga.

Se ni sukcesus fari botelon por trinkita en Rusujo brando dum unu jaro, ĝia diametro egalus 135 arŝinojn, ĉirkaŭo — 405 arŝ. kaj alteco — 597 arŝ.

## Konsideru!

### La dekalogo por edzinoj.

La edzino de l' fama poeto Maeterlink, konata artistino Leblanc, formulis principojn, kiuj helpis ŝin fariĝi feliĉa edzino kaj resti tia ĝis nun, malgraŭ „multaj malfacilaj cirkonstancoj“.

Jen la dek principoj de feliĉa edzino:

1) Forgesu neniam, ke edzino estas nedisigebla parto de perfekta tuto, kiun konsistigas du individuoj.

2) Ĉiu duono de geedza tuto havas siajn specialajn taskojn: estas la via — atenti ĉion, antaŭvidi, cedi, gajigi, trankviligi kaj tiamaniere influi kreskon de spirita fortoj de edzo.

3) Neniam konfidu zorgojn pri fizika bono de edzo — al dungitaj personoj: lernu kaj ekzercu ĉiutage en sperto elekti kaj prepari destinitaj por li manĝoj.

4) Atentu ĉiutage, ĉu liaj vestoj estas en ordo, puraj kaj konvenaj por jarsezono.

5) Penu esti senerara barometro, laŭ kiu vi povus ĉiam antaŭvidi eksplodon de elektro ofte kolektiĝanta en geedza kunvivo, kaj fari ĝin sennoca.

6) Konsideru vin kiel antidoto de malbona humoro de via edzo: estu tamen gaja akompanantino de liaj gajaj horoj.

7) Detenu vin de dorlotoj, ĝis kiam vi konvinkigos, ke la tagmanĝo estas sen riproĉo; la kisoj por malsata edzo estas kiel ŝaŭmo por sekigita lango.

8) Langon vi uzu nur por jesi — sed por nei uzu nur okulojn.

9) Se via edzo havas atakon de podagro, ne parolu al li pri danco.

10) Se vi volas konvinki edzon, ke vi estas pli bona artistino ol Sara Bernhard, pli bona dancistino ol Pavlovna, vi konvinku lin, ke vi scias pli bone kuiri ol Escoffier.

M.

## Kroniko.

*Ĉar lastatempe ni ricevis malmultajn komunikojn el la provinco — ni insiste petas niajn korespondantojn alsendi al ni mallongajn raportojn pri la provinca movado.*

### Varsovio.

La Komitato de Pola Esp. Societo aranĝas 5-an de Oktobro je la 8-a vespere en „Uranja“ (Bracka 18) — monatan kunvenon de la membroj kaj gastoj kun la sekvanta programo:

- 1) Prova leciono de Esperanto — s-o M. Czerwiński;
- 2) Pri la VII-a Kongreso en Antverpeno — s-o Ant. Grabowski;
- 3) Pri la Kongreso en Krakovo en j. 1912;
- 4) Recitaĵoj — s-o M. Czerwiński;
- 5) Diversaĵoj.

La membroj estas petataj enkonduki gastojn.

**Lvovo.** La 29-an de majo (lunde) okazis en klubejo de Lvova „Societo Esperanto“ granda kunveno de Lvovaj esperantistoj kun tagordo:

*VIII-a Universala Kongreso Esperantista en j. 1912 en Kraków. Elekto de la prepara antaŭkongresa Komitato.*

Ĉeestis ĉirkaŭ 130 personoj. Post la antaŭparolo de nuna prezidanto de la Societo, s-o B. Skalkowski, priparolis la aferojn de Kongreso d-ro Fels, d-ro Mikołajski kaj s-o Giercuszkiewicz, post kio oni elektis lokan antaŭkongresan Komitaton, kies estraro estas jena: d-ro B. Skalkowski, prezidanto, d-ro S. Mikołajski, vicprezidanto, s-o H. Wierzchowski, kasisto, s-o Wł. Giercuszkiewicz, sekretario I, s-ino Fels, sekretario II, s-o B. Herold, delegito de U. E. A.

Unua decido de la Komitato resumiĝas: jam hodiaŭ oni devas energie alpaŝi al preparaj laboroj de la Kongreso kaj akcepti provizoriajn aliĝojn por decidigi Antverpenan Kongreson elekti Krakovon por venonta Kongreso.

Ni sciigas, ke s-ro J. S. Lepszy jam ne estas pro manko da tempo nia sekretario; kiel sekretario funkcias nune nia konata samideano s-o Franciszek Engel.

„Teknikista Grupo de Esperantistoj“:

Alvoko!

Ni insiste petas ĉiujn polajn societojn es-

perantistajn, ke ili ne prokrastu kaj tuj sendu siajn ekspoziciaĵojn por granda „Esperanto-Ekspozicio“ en Lwów.

Ni ankaŭ turnas nin al ĉiuj Eldonejoj kaj Librejoj Esperantistaj, ke ili kiel eble plej baldaŭ sendu siajn eldonadojn laŭ adreso:

Benedikto Herold, delegito de U. E. A.

L v o v o, Potockiego 22, Galicio, Aŭstrio.

**Olkusz.** Kelkaj lernantoj el metia lernejo studas Esperanton kaj ankaŭ multaj personoj interesiĝas pri ĝi.

W. L.

**Gdańsk (Danzig).** Dum sia somera restado apud la Baltika marbordo en Sopoty (Zoppot) s-o A. Grabowski havis la okazon viziti kelkfoje la Gdanskajn (Danzigajn) samideanojn kaj ĉeesti iliajn kunvenojn. Li rakontis al ni pri la fervora laboro de la bravaj Gdanskanoj, kiuj, gvidataj de la registara medicin-konsilanto dr. Seeman, ne interrompis la kunvenojn eĉ dum la plej varmegaj tagoj kaj parolas nian lingvon tute flue. S-ino Tuŝinski (?) prezidantino de la loka U. E. A. - grupo instruas kun permeso de la komandanto ĉirkaŭ 50 soldatojn, kiuj dividitaj en du taĉmentojn po 25 — almarŝas ĉiutage militist-orde en ŝian domon por aŭskulti la lecionojn.

### Esperanto en komerco.

La Varsovia filio de Akcia Societo J. A. John (str. Hortensja 7) sendis al ni esperante eldonitan ilustritan prospekton pri siaj artikoloj: lavmaŝinoj, banejoj k. t. p. En la letero la firmo deklaras dissendadon de senpagaj esperantaj katalogoj kaj prezaroj.

Ni gratulas la firmon kaj deziras al ĝi sukceson post alpreno de Esperanto.

### Ĉe la Fervoja Kompanio de Orleans.

Ni rememorigas al niaj legantoj, ke le Fervoja Kompanio de Orléans eldonis belegan broŝuron en Esperanto: „Turismo ĉe la Fervojo de Paris al Orléans“ (Tureno, Bretonio, Arvernio, Pirenejoj), kaj ke tiu broŝuro estas sendata *afranke* kaj *senpage*, oni sin turnu al la Fervoja Kompanio de Orléans (Bureau du Trafic-Voyageurs-Publicité), 1, place Valhubert, Paris.

Ĉiu samideano devas posedi ĉi-tiun broŝuron, kiu estas bona propagandilo.

(„La Movado“.)

## Bibliografio.

*R. de Ladevèze. Demandaro pri la Historio, Literaturo kaj Organizajoj de Esperanto por Esperantaj Ekzamenoj.* 1911. Friedrich Ader, Esperanto-Verlag, Dresden A., paĝ. 88.

La titolo de la verko ne estas plena, mankas en ĝi unu grava vorto; ĉar la aŭtoro ne prezentas al ni nur sekan „demandaron“ pri la cititaj objektoj, sed li donas post ĉiu demando tuj la deziratan respondon en formo de pli aŭ malpli longa artikolo. Ni do havas „demandaron“ kaj „respondaron“ aŭ kateĥizmon pri la Historio k. t. p. de Esperanto.

Tia esperanta verketo estis delonge ĝenerale sentata bezono, ĉar ne ĉiu kandidato je esperanta ekzameno havas la eblon studi la temojn laŭ diverslingvaj, ofte malfacile riceveblaj libroj kaj artikoloj. La ĉiurilate tre kompetenta aŭtoro de la „Demandaro“ meritas do nian laŭdon kaj dankon. Ni volonte konstatas, ke la verko de s-ro Ladevèze, dank' al koncizeco de l' stilo, estas multe pli enhavoriĉa, ol ni povus supozi laŭ ĝia titolo kaj amplekso.

A. G.

*H. de Balzac. La Vendeta.* Noveleto el la franca lingvo tradukita de Marcel Merckens. Kolekto de „Lingvo Internacia“, Paris, Presa Esperantista Societo. 1911. Paĝ. 120 + 4.

La bela rakonto de la franca klasika romanverkisto aperas en tre eleganta vestaĵo kaj la esperanta stilo de la tradukinto estas tiel zorgema kaj korekta, ke la verko estos ĉiurilate vera ornamo de ĉiu esperanta biblioteko. — Sed ho ve! s-ro Merckens jam ne aŭdas tiunĉi plene meritan laŭdon; al li ne estis eĉ permesite vidi la belegan libron kaj ĝoji pro la frukto de sia peno, talento kaj laboro! La senkompata morto forŝiris lin subite el nia rondo la 20-an de Majo 1911; do la „Vendeta“ estas kvazaŭ la adiaŭvorto de la brava kunbatalanto.

La sankt-memorato estis lernanto kaj longjara kunlaboranto de prof. Cart, kiu en la antaŭparolo al la „Vendeta“ kore adiaŭdiras la neniam lacan, multsuferintan, kleran kaj al la Esperanto ĝis la lasta spiro fidelan amikon kaj samideanon.

A. G.

*Esperantista Kantaro.* 17 liedoj (!?) originalaj aŭ esperantigitaj. Aranĝita de Karl Jost, Zürich (Svisujo). Prezo 40 sd. Universala Esperantia Librejo. 1911. Genève. Paĝ. 38.

La kantareto, harmonie kvarvoĉe aranĝita

trovis aplaŭdon de la kantemaj samideanoj ĉar ĝi reaperas jam en dua eldono, senigita de preseraroj kaj kelkloke muzike plikorektita. Krom kelkaj kantoj de d-ro Zamenhof la libreto enhavas aliajn originale esperantajn aŭ lerte esperantigitajn, precipe el germanaj famaj poetoj, kune kun popularaj belaj melodioj, kiuj restos eterne freŝaj kaj junaj. La populara itala melodio de „O dolce Neapoli“ (Santa Lucia) aperas tie-ĉi kiel muziko por la esperantista „patriota“ teksto „Esperantujo“, verkita lerte de s-ro H. Boucon. La Himnon „Espero“ s-ro Jost kantas laŭ muziko de anonima „Samideano“. Ni ne supozas, ke ĝi forpuŝos la jam popularan melodin de Baron de Ménil. — Malgraŭ la klarigo en la antaŭparolo, la vorto „liedo“ ŝajnas al ni malnecesa novaĵo.

A. G.

*Dresden kaj la Esperantistaro.* Gvidlibro kaj propagandilo kun ilustraĵoj. Friedrich Ader, Esperanto-Verlag. Dresden A. 1911. Paĝ. 126. Prezo: 2 respondkuponoj.

Se mi bone memoras, dum malfermo de la Antverpena Kongreso — la germana salutanto diris memfidan vorton pri la valoro kaj imitindeco de la germana propagandmaniero kaj organizo. Ŝajnas al mi, ke li estis poste kritikata de siaj samlandanoj pro tiu memfideco. Nu, havante antaŭ la okuloj la „Gvidlibron“, mi ekvokas: Li estis centfoje prava! Dank' al la luksa eksterajo la libro estas vera ĝuo por la videntsento; laŭ la enhavata materialo, la sciigoj pri la bonega organizo kaj propagando de Esperanto en Drezdno, la libro estas pli fortigo por la esperantista animo! Se envio ne estus ne-samideana sento, ni Varsovianoj povus envii la bravajn Drezenanojn. Ĉiuokaze ni studu ilian verkon kaj penu ilin imiti!

A. G.

### Gvidlibroj.

*Pejzajoj de Aŭstrio*, eldonita dela I. R. Ministerio por fervojaj aferoj, Wien.

La luksa albumeto estas vera juvelo de esperante eldonitaj gvidlibroj. Oni prenas ĝin en manojn kun vera ravo. Ĝi kvazaŭ aŭguras baldaŭan brilantan epokon de Esperanto, ĝi igas kredi, ke ankaŭ aliaj regnaj ministerioj komprenos neprecon de la lingvo internacia kaj ne ŝparos sian apogon por Esperanto.

Ni gratulas Aŭstrian Ministerion de Fervojoj; Aferoj pro eldono de la ĉarma libro-albumo de Aŭstria landoj.

**Lübeck**, gvidlibro tra la Lübeck kaj ĉirkaŭaĵo.

Ankaŭ bele eldonita kaj ilustrita libro, eldonita de la Unuiĝo por fremduloj. Multego da anoncoj en la fino de la libro pruvas la simpation de komercistoj por Esperanto.

**Vichy**, gvidlibreto.

Eleganta libreto kun utilaj informoj kaj priskribo de la famekonata franclanda kuracloko.

**Ravenna**, de d-ro A. Tellini, eld. en Bologne. La ampleksa kaj bela ibro kun multaj ilustraĵoj, priskribas Ravennon, ĝian historion, arton, muzeojn, vidindaĵojn.

**Turismo** ĉe la fervojaro de Paris al Orleans, eldonita de Aŭtomobila Firmo De Dion-Bouton.

Belega broŝuro! La eldono, papero, vidaĵoj, panoramoj, priskribo — ĉio de la unua ĝis la lasta paĝoj estas ĉarma!

Leginte la libron, ni faris impresoplenan vojaĝon tra Turenon, Bretanion, Arvernion kaj Pireneojn. M.

## Revuo de la Gazetoj.

*NOTO. En ĉi tiu fakto ni regule citas ricevatajn interesajn gazetojn en ĥronologia vicordo—laŭ tempo de ilia ricevo.*

- (30|VIII) Esperanto (20 Aŭgusto).
- (6|IX) Svisa Espero (Aŭgusto—Sept.).
- (6|IX) Monda Poŝto (25 Aŭgusto).
- (7|IX) Kaŭkaza Esperantisto (Julio).
- (7|IX) Gazeto Hispana (Aŭgusto).
- (7|IX) Juneco (Aŭgusto).
- (8|IX) Amerika Esperantisto (Aŭgusto).
- (8|IX) Belga Esperantisto (Aŭgusto).
- (9|IX) Bulletin Officiel (Septembro).
- (9|IX) Eŝo Esperantista (Aŭgusto).
- (9|IX) Japana Esperantisto (Julio).
- (9|IX) Juna Esperantisto (Aŭgusto—Sept.).
- (10|IX) Internacia Socia Revuo (Septembro).
- (10|IX) Laborista Esperantisto (Julio—Aŭg.).
- (10|IX) The British Esperantist (Sept.).
- (10|IX) La Spritulo (5 Septembro).

- (10|IX) Kataluna Esperantisto (Julio—Aŭg.).  
La devizo: „*Maro estas gutaro*“.
- (13|IX) Hungara Studento (№№ 4, 5, 6).
- (15|IX) Rund um die Welt (Septembro).
- (16|IX) La Holanda Pioniro (Sept.).
- (16|IX) Meksika Stelo (Julio — 2 n-roj) aperas ĉiudimanĉe; reaperas post la Meksika revolucio.
- (19|IX) Internacia Stenografika Gazeto (Aŭg.).
- (21|IX) Le Phare Sténographique (Sept.).
- (26|IX) Helpa Lingvo (15 de Aŭgusto).
- (26|IX) Amerika Esperantisto (Sept.).
- (27|IX) Universo (IX-a kajero).
- (27|IX) Esperanto (20 Sept.). — La numero estas dediĉita: al la VII-a Kongreso en Antverpeno, al la Kongreso de U. E. A. kaj al la Katolika Kongreso.

*Ni petas ĉiujn esperantajn Redakciojn sendi al ni interesajn po 2 ekz. de iliaj gazetoj. „Polan Esperantiston” ni sendos al ĉiuj esperantaj gazetoj senescepte.*

## Konkurs na odczyt o Esperancie.

Poniewaŭ na konkurs, ogłoszony w czerwcowym numerze „Esperantysty Polskiego”, otrzymaliśmy tylko jedną pracę, przeto uważamy za stosowne przedłużyć termin nadsyłania prac do 15 listopada r. b., a konkurs powtórzyć:

Redakcja „Esperantysty Polskiego”, chcąc przyjść z pomocą sprawie propagandy Esperanta, ogłasza niniejszym konkurs na napisanie po polsku odczytu oryginalnego (nigdzie dotychczas niedrukowanego)

**o Języku Międzynarodowym Esperanto.**

**Warunki:** Długość odczytu —  $\frac{3}{4}$ —1 godziny odczytowej. Termin: 15 listopada 1911.

Nadsyłane prace należy zaopatrzyć w pseudonim, a zamkniętą kopertę z nazwiskiem autora oznaczyć takim samym, jak pracę, pseudonimem.

**Nagrody** — dwie: I — 30 rubli, II — 20 rubli otrzymają autorzy dwóch prac, uznanych przez sąd konkursowy za najlepsze i godne druku.

Nagrodzone prace stają się własnością „Esperantysty Polskiego”.

# HUMORAĴO.

## La babilema edzo.

Mi veturis hieraŭ per rapida vagonaro kaj okupis la kupeon. Pro varmego mi lasis la pordon malfermita. En la apuda kupeo, kies pordo ankaŭ estis malfermita, sidis ia geedza paro kaj kondukis la sekvantan dialogon:

— Estas interese — diras la edzino — ke vi ĉe ĉiu paŝo disputas.

— Kaj eĉ nun ankaŭ...

— Hm...

— Kia „hm“? Mi diras, ke tiel devas esti kaj tiel estos. Vi ja scias, ke mi malamas, kiam iu faras spite al mi. Jen decidite, ke ni ekloĝos ĉe Georg, sed ne en Eŭropa hotelo. Cetere se vi ne volas, — vi povas loĝi en la Eŭropa, kaj mi iros al Georg...

— Hm...

— Nun ĉi-tio al vi ne plaĉas. Do estu tiel. Vi ĉiam faras opozicion. En la politiko vi estas konservatisto, sed en la hejmo — revoluciulo.

— Hm...

— Eble vi tion neas? Vi ĉion neas. Simile, kiel en la pasinta semajno. Mi volis viziti Hipotekoviĉ'ojn, sed vi ne, kvankam vi havis nenian kaŭzon; vi ĉiam agas laŭplaĉe...

— Hm...

— Nu jes, ni iris kun la vizito, sed kiom mi devis paroli, plori kaj fine mi perdis humoron...

— Hm...

— Vi volas diri, ke malgraŭ tio mi amuziĝis bonege. Nu jes, sed tio-ĉi ne

estas via merito, sed de Ludoviko, kiu vidante mian malbonan humoron penis min distri...

— Hm...

— Mi scias, mi scias, ke tio al vi ne plaĉis kaj al la Babilemska ankaŭ ne, kaj al Zvirski ne, kaj al aliaj ne, sed mi ignoras ilin, ĉu vi komprenas?!

— Hm...

— Ho jes, al vi ŝajnas, ke mi dependas de ili, ke mi ŝatas ilian opinion, sed vi eraras...

— Hm...

— Mi petas vin, vi ne rezistu — ĉar da tio-ĉi estas jam troe. Vi nur memoru pri tio, ke unu fojon mi pro via babil-emeco malsaniĝis kaj mi devis forveturi por kuracado...

— Hm...

— Kaj vi ĉesu hm-umi, ĉar ĉi-tio pasiĝas min. Se mi interesas vin — sed ĉu mi povas vin interesi?

— Hm...

— Mi petas vin, mi ĉion toleros, sed ne ĉi-tiun eternan „hm“.

— Hm...

— Vi estas malbela babilemulo kaj babilema edzo estas eble la plej malbela el edzoj.

— Lvovo! — ekvokis la konduktoro.

— Ah, ĉi-tie ankoraŭ ne povas esti Lvovo — ekvokis la sinjorino.

— Hm... ekmurmuris la edzo.

— Vi ree oponas?! — ekdemandis ŝi riproĉe.

**Klewe.**

*Trad. M.*

## Respondoj de la Redakcio.

*Al s-o St. P.* La tradukon el Heine ni ne uzos.

*Al s-o K. Wasilewski en Vars.* Kunlaboradon ni tre volonte akceptos. La aforismojn de Nietzsche ni ne ricevis, do vi bonvolu alsendi ilin.

*Al s-o W. Mazurkiewicz en Dąbrowa.* Ni tute konsentas kun via opinio pri instruado distance, Ĝi estas vere aranĝinda afero. La adreson de d-ro Ostrovski ni ne konas.

*Al s-o Salviro en Łódź.* Ni dankas; la afero ne estas detale konata kaj ne indas disfamigon.

*Al s-o M. Bron. en Vars.* La traduko de Korczak estas bona en la lingva senco; la enhavo kaj la literatura valoro ne konvenas por ni.

*Al s-o W. Grabowski en Kraków.* Ni dankas.

*Al kelkaj.* Ni tre volonte enpresus la parolon de s-ro Rosenstock, diritan dum la VII-a Kongreso — kiu sendube interesas polajn esperantistojn, sed, bedaŭrinde, ni ne posedas ĝian tekston.

*Al multaj samideanoj,* kiuj afable alsendis al ni diversajn gazetojn — ni plej kore dankas.